

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, aldono al HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO
senpaga por ĝiaj abonantoj. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. — Glorieta
de Bilbao, 5, MADRID

NUM. 3. — MARTO 1928

ZAMENHOF MORTIS!

(Soneto)

Tre amis via la spirit' Homaron,
Por ĉiuj estis frata via koro;
Devizoj viaj estis am', honoro,
Al kiuj vi aldonis gloran faron.
Timante ne la montojn kaj la maron,
Flugadis brile ĉien via gloro,
Kaj ĉie restos via rememoro,
Ĉar Homoj jam ĝin metos sur altaron.
Nun tra la Mondo kuras sanga fluo;
Nun ploras via «*familia rondo*»;
Planedo tremas pro pafada skuo!
La ŝipo brulas sur la mara ondo!...
Dum regas la malamo kaj detruo,
Vi jam ne povas resti sur la Mondo!

Rafael de San Millán (†)

Madrid, 1917.

Rimarko. — Ni revivigos la zamenhofan senton de ĉi tiu fidela disĉiplo de la Majstro, kiu verkis mirinde, pleninspire, laŭ tute zamenhofa stilo, por ke ĉi tiu glora hispana homarano okupu la lokon, kiun li meritas.

VII^a HISPANA KONGRESO EN SEVILLA

(De la 5.^a ĝis la 9.^a de Novembro de 1928)


Ĉar malaperis «La Suno Hispana», kiu publikigadis ĉion pri nia proksima Nacia Kongreso de Esperanto, ni nin turnis al «Hispana Esperanto» por ne interrompi la informadon. Ĉi tiu estu hodiaŭ nur pri la «Internacia Esperanta Literatura Konkurso», petante al la samideanaro atentu bone la gravecon de la Konkurso, ju pli grava ĝi estu konsiderata, des pli grave konsci la neceson kolekti kiel eble plej grandan sumon por lo premioj, pro kio ni petas al ĉiuj samideanoj sendu al ni eĉ plej modestan sumeton. La konkurso meritas specialan favoran atenton ĉies, kunlaboradon de ĉiuj hispanaj samideanoj por, krom siaj mondonacoj, varbi mondonacintoj kaj atingi tiamaniere estu altaj la premioj.

Jen listo de mondonacintoj ĝis fino de la ĵus pasinta Decembro:

	Pesetojn
Hispana Esperanto-Asocio.....	200
Esperantista Grupo de Sevilla.....	100
Centra Esperantista Grupo de Madrid.....	50
S-ro Carlos Martínez, de Sevilla.....	25
» Isidoro Díaz, de Tocina (Sevilla).....	2
» Antonio Marmol, de Villanueva de las Minas.....	2
» Juan Moros Ojeda, » » » ».....	1,50
» Ignacio Casas Riaño, de Burgos.....	4
» Rodrigo Almada, de Badajoz.....	4
S-ino. Rosa Fernández de Almada, de Badajoz.....	2
F-ino Carmen Rodríguez, de Sevilla.....	1
S-ro Fernando Redondo, de Las Palmas.....	10
Asturiano Amanta Esperanton.....	15
Esperantista Grupo de Jerez.....	5
S-ro Eugenio Lunate Pérez, de Baracaldo.....	4
En tute ĝis la 31 de Decembro, 1927.....	425,50

Ni esperas dum ĉi tiu jaro, ĝis la dato de la Kongreso pli ol duoblighi la antaŭan sumon.

Pri ĉi tiu internacia literatura festo oni propagandis vaste per cirkuleroj, kiujn ni sendis al ĉiuj esperantaj gazetoj, sed speciale «Esperanto» de U. E. A. aperigis la cirkuleron sur siaj paĝoj de la n-roj de Januaro kaj Februaro. Sur «Heroldo de Esperanto» kaj «La Suno Hispana» ankaŭ aperis kompleta la cirkulero.



Enrejo al salono de Ambasadoroj en la Alkazaro.— Sevilla.

Jam ni ricevis du originalaĵojn, kiuj venis de Polujo kaj Francujo. La juĝistoj por tiu ĉi Konkurso estas: S-roj. Th Cart, kaj Jonh Mabon Warden, Prezidanto kaj Vicprezidanto de nia Esperanta Akademio, kaj la fama poeto kaj Lingva-komitatano Leon Belmont.

Sur la proksima n-ro de «Hispana Esperanto» ni daŭrigos la liston el Kongresanoj kaj informadon pri la Kongreso.

Hispanaj Esperantistoj! Alsendu kiel eble plej rapide vian mondonacon por la Esperanta Internacia Literatura Konkurso okaze de nia VIIa Nacia Kongreso de Esperanto en Sevilla.

Sevilla 1^{an} de Marto de 1928. Je la nomo de la Loka Organizanta Komitato, La Sekretario-Trezoristo. Karlo Martínez Fernández.

Rimarko.—Leterojn, kotizojn, mondonacojn, sendu al la Sekretario-Trezoristo: strato Rioja, 25-Sevilla.

S-RO MANUEL ESTEBAN SAEZ

Statistikestro sepdeksesjara, mortis la 8.^{an} de Februaro ĵus pasinta, en Puente de Vallecas-Concordia, 1-Madrid.

Li estis unu el niaj unuaj entuziasmaj pioniroj dum la malfacila unua epokoesperantista, kiam la atakoj de kontraŭuloj, moko de skeptikuloj kaj ĉiaj malfacilaĵoj al nia afero, postulis grandanimecon, klerecon, spertecon, kiujn li posedis altgrade. Li fondis la Grupon de Burgos, en ĉi tiu urbo li estis Delegito de UEA kaj prezidis la Hispanan Asocion por propagando de Esperanto de 1909 ĝis 1912. Li pagis la eldonadon da 20.000 ĉefeĉajn ŝlosilojn, el kiuj restas ankoraŭ 3-4000 specimenoj. Li ripozu pace apud la Majstro, kaj liaj familianoj ricevu de la Hispana Esperantistaro la plej sincere koran kondolencon.

LA PROGRESO DE HISPANA ESPERANTO ASOCIO

Estas bedaŭrinde, ke iuj samideanoj semu ĉu parole, ĉu skrive, dirojn pri morto de H. E. A., ĉar precize okazas tute male, H. E. A. pli kaj pli kreskas kaj disvastigas sian agadon en novajn lokojn kaj vigligas la aferon en tiujn, kiuj ne havis intensan movadon. Ĉi tie mem, en

Madrido, antaŭ nemulte iu parolis pri la morto de H. E. A. antaŭ ĝia kasisto, en ĉiutaga kunveno, kaj la kasisto kontraŭdiris asertante per la mono ekzistanta en la kaso, kaj la mortparolinto aldonis, ke la mono estas heredo pro testamento; de du-trilokoj venis leteroj, kiuj vidigas semon el opinioj pri la samo. Pruvo pri nia firma vivo kaj prospereco estas la financa stato de H. E. A. Hodiaŭ eĉ ni havas ŝlosilojn Ĉefeĉ, kiujn ni povas liveri al la Grupoj kaj samideanoj. Jen la kalkuloj, kiujn ĵus aprobis la Aŭtoritato:

KASKALKULO JE LA 31 DE DECEMBRO DE 1927

ŜULDAS

Antaŭa saldo	376,55 pesetojn.	
Enkasigitaj kotizoj de 1926.....	64,00	»
» » de 1927.....	1.229,25	»
Donita de S-ro Mojado pro saldo de «La Suno Hispana» je la 31 de decembro de 1926.....	50,00	»
Ŝtata subvencio.....	500,00	»
En tute.....	<u>2.219,80</u>	»

HAVAS


Kotizo de H. E. A. al la konstanta Reprezentantaro de Nacioj.....	200,00 pesetojn.	
Fakturo pro 2.000 kovertoj anoncantaj la Kongreson de Sevilla.....	50,00	»
3 ĝirojn al «La Suno Hispana» pro abonoj.....	595,50	»
Ŝargataj kontraŭ «La Suno Hispana» pro kotizoj al H. E. A.....	80,50	»
Donaco por Literatura konkurso de Sevilla	200,00	»
Elspezo pro 6 ĝiroj kaj poŝto.....	7,15	»
1 pagletero pro subvencio de 1926.....	24,00	»
1 same pro subvencio de 1927	13,55	»
Stampoj kaj impostmarkoj sur kelkaj dokumentoj..	7,45	»
Inko kaj kajero.....	5,50	»
Fakturo pro kuponoj	25,00	»
» pro 2.500 ŝlosiloj Ĉefeĉ.....	250,00	»
Mono en la kaso je la 31 de decembro de 1927.....	761,15	»
En tute.....	<u>2.219,80</u>	»

Kiel oni povas rimarki la financa stato de nia Asocio estas sufiĉe bona, kaŭze de granda ŝparo kaj bona administrado; sed ĝi ne estas tute kontentiga por disvolvi la tutan laboron, kiun ni devas fari, kaj konsciu, ke nia Kongreso de Sevilla postulos multe da mono, pro kio estas necese, ke la H. E. A.-anoj pagu kiel eble plej rapide la kotizon por la nuna jaro kaj penadu varbi kiel eble plej multenombrajn membrojn. Estas konstatinde, ke dum la pasinta jaro la membraro multobliĝis, kaj espereble estas, ke same okazos dum ĉi tiu jaro, ĉar nia movado grave kaj firme antaŭenpaŝas, kaj en iuj lokoj la propagando fariĝas vigla kaj fruktopromesanta. Ĉiu el ni havas la devon altiri al nia Asocio multajn malnovajn esperantistojn, kiuj iam estis eĉ entuziasmaj kaj tre agemaj, sed kiuj ankoraŭ ne aliĝis al H. E. A. La komitato laboras ankaŭ por atingi de la ŝtato pli altan subvencion, ol estis tiu de la pasinta jaro; la Lernejinspektoro, kiu inspektis la laboron de H. E. A., tre bonege informis la Ministron de Publika Instruado por ke la Ministerio monhelpu la Asocion; ĵus la Asocio prezentis en la aludita Ministerio la dokumentaron konsistantan el Raporto pri la laboro farita, pri bezonataĵoj por la laboro, pri baroj trovitaj, kiujn la Ministerio malaperigu; el Plano de laboro por la nuna jaro kaj aspiroj de H. E. A., kaj el kopio de la regularo. Espereble estas, ke H. E. A. atingu almenaŭ same, kiel la pasintan jaron, sed tial ke oni konstatis la okazigon de la Kongreso de Sevilla, oni esperas pli grandan sumon. Oni atentigis la Ministron pri la gravaj konferencoj de Praga kaj Locarno, pri la kunlaborado de niaj instruistoj al la laboro, kiun entreprenos la Instituto de Geneve kaj Internacia Asocio de New York (pri kiuj oni parolas poste en la Eksterlanda kroniko) pri internacia lingvosistemo; same oni atentigis lin pri la neceso dekreti denove pri la Reĝa Ordono de la 27 de julio de 1911, rajtiganta la Esperantajn Grupojn por klarigi Esperanton en la Lernejoj, Institutoj; Universitatoj k. t. p., instigante lin por fari la «Eksperimenton de Eccles» oficiale.

Per la kroniko vi rimarkos, ke la Madrida samideanaro, ĉiam je la nomo de H. E. A., seninterrompe agadas; ke en aliaj lokoj, kiel Oviedo kaj cetero de Asturias, rapide kreskas nia afero. Nepre necese estas, ke rekuraĝigu kaj reagu samideanoj de aliaj lokoj, en kiuj la movado iam estis vigla.

Paralele, en plena kunlaborado kaj interkonsento, agadas nia Hispana Esperanto Instituto.

Ĵus, pro la granda kaj forta movado en Asturias, estas elektitaj regionaj voĉdonantoj de la H. E. A. en ĉi tiu regiono la entuziasmaj kaj



Katedralo.—Sevilla

agemaj samideanoj Eduardo J. de Castro (ĉefingeniero de la Haveno de l'Musel-Gijón) kaj Antonio Jiménez Mora (Infanteria kapitano kaj nelacigebla pioniro); kaj estas esperinde, ke nia afero baldaŭ reekĝermos en Galicia, kie estas tre kompetentaj samideanoj.

Certe vi rimarkis kiamaniere ankaŭ niaj enlandaj samideanoj atentis la manieron organizi kiel eble plej bone la tutmondan Esperantistaron al firma Esperantujo. La Kongreso de Sevilla per sia Internacia konkurso tion celas, kaj sur ĉi tiu gazeto jam aperis opinioj. Tio ĉi pravas, ke estas ĉe ni fervoro, entuziasmo, laboremo, ke nur mankas solidaremo, kiun nepre ni devas havigi al ni, por plej bone fruktigi la aferon, por ke nia kaso estu pli riĉa kaj povu starigi premiojn por lernantoj en ĉiuj regionoj, kiujn la regionaj voĉdonantoj de la komitato administros.

Jen, fine, la progreso de nia Asocio:

1925 (jaro de la restarigo pli, ol fondo).....	89	Membrojn.
1926.....	143	»
1927.....	283	»

El la membroj estas: 14 Instruistoj; 7 Pastroj; 7 Advokatoj; 3 Inĝenieroj; 16 Militistoj; 10 Kuracistoj; 18 Komercistoj; 6 Industriistoj; 5 Apotekistoj; 21 Oficistoj; 7 Pentristoj kaj Desegnistoj; 10 Telegraf kaj Poŝt-Oficistoj; 8 Studentoj; 4 Meĥanikistoj; 2 Tajlorinoj, 1 Dentisto; 3 Policianoj; 1 Fotografisto; 4 Barbiroj; 1 Ĵurnalistoj; 1 Kompostito; pri la profesio de la ceteraj nun ni ne konas. SENDU TUJ LA KOTIZOJN al mi, strato Abascal, 13 aŭ al la kasisto, S-ro Pelayo Moreno Ferrer, strato Pontejos, 1, Madrid. La kotizo estas: DU pesetoj KVINDEK centimoj por la novaj, pro la karneto; kaj dank' al interkonsento kun ĉi tiu gazeto, H. E. A. liveros ĝin ĉiumonate al siaj membroj, kiuj estos sendintaj TRI pesetojn por la abono.


MARIANO MOJADO

Sekretario de H. E. A.

KRONIKO

ENLANDA

Oviedo. — La ĵurnalaro daŭrigas aperigante novaĵojn pri esperanto kaj varme opinias pri okazigo de Hispana Kongreso en ĉi tiu urbo. La Provinca Deputataro aliĝis al VII^a Hisp. Kongreso de Sevilla kaj nomis S-ron Antono Jiménez Mora, Delegito por tiu kongreso kaj peti, ke




Sevilla.—Unu el la Palacoj de la Ekspozicio

la VIII^a okazu en Oviedo; ĉi tio estas grava decido, kiu vidigas la grandan atenton al nia movado en tiu ĉi regiono de nia lando. Kvin kursoj disvolvigadas en la Popola Ateneo, Katolika Klubo, Ĥoraro, Infanrifuĝejo kaj Laborista Klubo.

Nova esperanta Grupo fondiĝis en Trasona (apud Avilés).

Madrid. La 10-an de la ĵus pasinta februaro okazis en la teatro de la Popoldomo sukcesplena propaganda festo de Esperanto okaze de kursmalfermo por la Socialistoj. Kelkaj centoj da personoj, multaj el ili ne socialistoj, ĉeestis la kunvenon ĉar estis tute publika. Unue parolis elokvente, sprite kaj tre fundamente por konvinki, Pastro Mariano Mojado, Sekretario de H. E. A. kaj Prezidanto de nia Instituto; sekve la ĉefredaktoro de la ĵurnalo *El Socialista*, S-ro. Cayetano Redondo, kiu mirinde parolis rimarkigante siajn spertadojn per Esperanto dum sia vojaĝo al Vieno kaj restado ĉi tie por ĉeesti la kurson, kiun organizis la Socialista Esperantista Ligo de Aŭstrio, kvankam li timis multe ĉar li estis nur lerninta la lingvon tri monatojn (kaj ne regule) de antaŭ la forveturo. Li atentigis pri la profunda sento de frateco kiun li rimarkis kaj konstatis ĉie inter la esperantistoj, tiamaniere ke li miris kvazaŭ sin trovante ĉe sia propra hejmo mem, inter sindonemaj familianoj, pro kio li konstatis utilecon de Esperanto por ligi la tutmondan socialistaron, kaj tial li varme rekomendis al la hispanaj socialistoj lerni Esperanton por kio, sekve, oni decidis malfermi esperantan kurson. Poste la ĥoreto de la Grupo «Antaŭen» kantis sian himnon, tiun de la Hispanaj Rotarioj, «La Madelon» kun versaĵo esperantpacema; kaj kelkajn fremdajn kaj hispanajn popolkantojn, ricevante tiom da aplaŭdoj kiom da ili ankaŭ premiis la paroladojn de S-roj. Mojado kaj Redondo. Tuj multenombraj socialistoj enlistigis sin por la kurso kaj baldaŭ fondiĝos potenca socialista Grupo.

Zaragoza.—Ĉi tie tre entuziasme revigliĝas nia movado; la samideanoj de la Grupo «Frateco» energie propagandas: en la grupejo gvidas kvar kursojn S-roj. Artigas, Loren, Gracia kaj Carnicer; nia aragona kaj nelacigebla pioniro, S-ro. Manuel Maynar, ĉe li klarigas nian lingvon, S-ro. Gaston klarigas Esperanton al la skoltaj, kaj S-ro. Oros, al la poŝtaj kaj telegrafaj oficistoj. La nova komitato de la Grupo estas: S-ro. Manuel Maynar, prezidanto; S-ro. Isidoro Achon, vicpr.; S-ro. Francisco Lhotellerie, trez.; S-ro. José Carnicer, viktrez.; S-ro. Emilio Artigas, kalkul.; S-ro. José Oros, sekr.; S-ro. José Larruga, vicsekr. kaj bibliot.; voĉdonantoj, F-ino. Sara Maynar kaj S-roj. Alejandro Espiago, Rafael Gaston kaj Vicente Lorén.



Placo de España; Ekspozicio. — Sevilla

Barcelona. – Estas rimarkinda la laboro de la Barcelona Esperantista Grupo «Fajro», ĝi trafis la gravan ĵurnalon *Las Noticias*, kiu ĉiudimanĉe sur plej konvena paĝo aperigas longan dokumentitan artikolon pri Esperanto vidigantan la progreson de nia lingvo kaj ĉion koncernantan la Esperanto-movadon. La hispana samideanaro sendu al la Direkcio de *Las Noticias* dankesprimojn per letero aŭ poŝtkarto, ĉar ni ŝuldas ĉi tion al ĝi almenaŭ.

Unu el plej gravaj kursoj en Barcelona estas tiu, kiu disvolvigadas en la «Colegio-Academia Torner», kun preskaŭ ĉiuj ĝiaj lernantoj, kiuj studas praktike kaj kompare la lingvon, kaj aktive interŝanĝante korespondaĵojn desegnaĵojn, fotografaĵojn, k. c., kun alilandaj lernantoj. Dezirinde estas, ke ĉi tiu Lernejo-Akademio kunlaboradu kun «lala» kaj Instituto «Jean Jacques Rousseau».

Ni bone scias pri gravaj esperantaj entreprenoj de niaj barcelonaj kunlaborantoj S-roj. Rómulo S. Rocamora, José Anglada kaj cetere, sed nun ni povas ankoraŭ paroli pri tiuj entreprenoj.

Tarrasa (Barcelona). – Ni laŭdu senĉese kaj altgrade la laboron de la malnova pioniro de Esperanto en Tarrasa, nia kara malnova kunlaborinto, S-ro. Sebastián Chaler; li endormigadis sur siaj laŭroj, sed feliĉe malĝentila nerespektemo de Idisto al Zamenhof, vekis nian amikon, kiu sin ĵetis denove en la Esperanto-laborkampon tiel energie, entuziasme kaj nelacigeble, kiel dun la malbonaj tempoj de la milito kiam li agadis ĉe la «Zamenhofa» Federacio. Li celis eldoni hispanlingvan gazeton por propagandi nian karan lingvon, sed li, malriĉa, kiel ĉiu apostolo, nur povis aperigi unu numeron, tamen li sukcesis kaj sukcesadas: tuj li fondis Grupon en Navás (apud Manresa), li revivigis la Grupon «Burgono» de Rubi; li aliĝis al H. E. A.; li reenvicigis sin en la agemularon de la Grupo «Lumon» de Tarrasa, kaj pro lia aktiva kaj fruktodona laboro, oni elektis lin prezidanto; li fondis novan Grupon en Barcelona ĉe la «Centro Vinarocense», ĉar li naskiĝis en Vinaroz (Valencia). Fine li klarigas la jenajn kursojn: lundon, en la Grupo de Tarrasa; mardon, en Rubi, por fraŭlinoj; merkredon kaj ĵaŭdon, en Rubi, por viroj; vendredon, en la Grupo de Tarrasa; sabaton, en Barcelona. Krom tio li verkas por ĵurnaloj *El Pueblo* de Valencia, *El Diluvio* de Barcelona, *La Acción* kaj *El Día* de Tarrasa, pri Esperanto. Atentu la malnovaj pioniroj, kiuj ankoraŭ ne revekiĝis, revenu tuj al nia kamplaboro.

SENDU KONCIZAJN NOVAĴOJN PRI NIA MOVADO

La Grupo «Antaŭen» liveras argéntajn belajn esperantajn insignojn. Specimeno po 2,25 pesetoj afrankite. Vi vin turnu al la Sekretario S-ro. Vicente Moren, Paseo de Extremadura, 90, Madrid.

EKSTERLANDA

Esperantista Akademio.—Jen letero de la Prezidanto de nia Akademio, vere oficiala komuniko:

Parizo, la 18^{an} de januaro 1928 - kara sinjoro Redaktoro! D-ro Privat parolas en la januara numero de «Esperanto» pri « eminentuloj », kiuj ian tagon povus perfidi. Ĉu eble? Mi tre dubas. Se vere, mi povas certigi, ke inter la eminentaj perfidontoj (?) troviĝas neniu Akademiano. Ĉiuj estas kaj restos fidelaj: ankaŭ kiam post multaj, multaj jaroj—kiujn apenaŭ kelkaj versajne ĝisvivos—la Registaroj oficialigos Esperanton; ili tiam fidele sekvos la vojon montritan de D-ro. Zamenhof en la Washington' a Kongreso; ili opinias kiel li, ke, se iam registare starigota komitato... traktos sian taskon serioze... La postkomitata Esperanto restos tute la sama lingvo, kiel la Esperanto antaŭkomitata kaj ke « nur eble kelkoj nunaj formoj fariĝos arĥaismoj..., neniel rompante la kontinuecon de la lingvo kaj neniel ruinigante la valoron de tio, kion ni ĝis nun akiris ». Ni ne ŝanceliĝis hieraŭ, ne ŝanceliĝas hodiaŭ, ne ŝanceliĝos morgaŭ. Firme kaj tute trankvile ni daŭrigu nian poresperantan laboron! Kun kora saluto. Th Cart. Prezidanto de la Lingva komitato.

Grava laborotaĵo.—Novaj enketoj kaj eksperimentoj pri la mondhelplingvaj sistemoj estos entreprenataj per kunlaborado de International Auxiliary Language Association in the United States, Incorporated (Amerika Asocio por Internacia Helplingvo)—«IALA» en New York, kaj la Instituto «Jean Jacques Rousseau», en Geneve (Svisujo). La unua Asocio, fondita je 1924 estas tute neŭtrala kaj celanta enkonduki unu helplingvon en la Lernejoj, por kio ĝi studadas kaj esploras ĉi tiun problemon laŭ la diversaj sistemoj. La Instituto de Genève estas altlernejo pri edukaj sciencoj kaj pedagogio, eksperimentante speciale pri infanpsikologio kaj eksperimenta pedagogio, pro kio jam de kelkaj jaroj ĝi interesiĝis pri Esperanto kaj ĝia enkonduko en la lernejoj. Ambaŭ Asocioj sufiĉe bone jam spertis pri Esperanto kaj ĉi tiun konsciis enkondukinda, sed espite de ĉi tio, kvankam dum la jaroj 1925-26 okazadis konsultoj en York inter la direktoro de la Ĝeneva Instituto

P-ro Bovet, reprezentantoj de «IALA» kaj de aliaj gravaj usonaj Institutoj, oni decidis laboron celantan: l. Mezuri la progresojn dum lernado de helplingvo en kursoj de lernejoj, kies instruistoj volas partopreni serioze la eksperimenton instruante iun ajn lingvon.

Il Prepari diversspecajn «testojn», kaj eksperimentadi sur la bazo de tiuj «testoj» kun la helpo de la instruistoj, kiuj deziras kunlabori.

La celo entreprenata de «IALA» kaj la Instituto postulas kunlaboradon de la reprezentantoj de la diversaj mondhelplingvaj sistemoj.

La hispanaj instruistoj dezirantaj partopreni ĉi tiun laboron sin turnu al Dro-Dietterle-Esperanto Instituto por la Germana Respubliko-Seumestrasse, 10-Leipzig-Schl., kiu detale kaj regule raportos pri la laboro farota; kaj Hispana Esperanto-Asocio varme rekomendas al siaj samideanoj Naciaj Instruistoj partopreni ĉi tiun laboron, por ke Hispanujo staru honore apud aliaj nacioj, ĉar la mirindaj kapabloj de niaj geinfanoj esperigas bonegan rezultaton.

Esperanto en Internaciaj kongresoj. — La *katolika* en Holandujo, dum la proksima somero; la *Interreligia por Paco* de la 31^a de julio ĝis la 2^a de aŭgusto de ĉi tiu jaro, en Hago; *Internacia konferenco de guidantoj de pac-movado junulara*, de la 12^a ĝis la 24^a de aŭgusto en Ommer, en Holandujo ankaŭ; *Internacia religia-socialista*, de la 30^a de aŭgusto ĝis la 2^a de septembro, en Le Locle (Svisujo), kaj *Internacia pri Edukado*, dum la somero de 1929, en Kopenhago, uzos nian lingvon ĉu por diskutoj kaj dokumentoj ĉu sole kiel tradukilon.

Francujo. — En Toulouse, de la 27^a ĝis la 30 de la ĵus pasinta decembro okazis la unua kongreso de la Franclanda Esperantista Universitata Federacio kies honora Prezidanto estis S-ro. Herriot, ministro de Publika Instr., kiu delegis la Rektoron de la Toulousa Universitato por reprezenti lin. Ĉeestis la kongreson D-ro. Privat. Oni diskutis pri organiza sistemo kaj propaganda taktiko; decidis fondi Centran Oficejon por universitataj informoj; peti, ke la Ministerio de Instruado oficialigu la diversgradajn diplomojn pri Esp.-studado, donataj de la S. F. P. E.; inviti la ICK meti en la tagordon de la 20^a kongreso la temon «Esperanto en Universitato, kaj okazigi tie diskuton inter membroj de ISAE, TEKA, TAGE, k. c. Oni altiris bone la publikan atenton per radio, paroladoj kaj ekspozicio.

Danĉio. — La 10^{an} de la ĵus pasinta novembro, la Senato de la Libera ŝtato dekretis favore je la peticio de la Danciga Esperanto-Asocio, konsentante nedevigajn Esperanto-kursojn en la supera ŝtupo de la Elementaj Lernejoj (6-8 lernjaro), se ekzistas taŭgaj instruistoj

kaj instruistinoj por tio, kaj ĉi tiu instruado ne malhelpas la oficialan programon de la Lernejoj. Peticioj pri permeso devas esti adresataj al kompetentaj distriktaj instru-konsilantoj kiujn la Senato rajtigis pri la enkonduko.

GERMANUJO

Prusujo.—La Gimnazio de Sprotan (Silesio) enkondukis Esperanton en la tri superajn kursojn de antaŭ kelkaj jaroj.

Bavarujo.—Kaŭze de peticio de la Esperantistoj de München kaj Nürnberg, kiun valorigis atestoj de gravaj komercaj firmoj, foiroj de Frankfurt kaj Leipzig, industriistoj, kaj de D-ro Adolf. Schmidt direktoro de la Observatorio kaj profesoro de la Universitato de Berlin, pri enkonduko de nedevisa Esperanto-instruo en la mezlernejoj, okazis la 21^a de januaro diskuto en la bavara Parlamento: D-ro Wohlmuth (de la Bavara Popola Partio) parolas kontraŭ la peticio de la vidpunkto financa pro dungo de instruistoj ĉar de la vidpunkto lingva li diris: «Estus tre bele, se la babilona lingvokonfuzo estas forigebla.» D-ro Hoegner (socialdemokrato) prave argumentis favore je la peticio, kaj tute same profesoro Mager (komunisto) kiu rimarkigis la utilecon kaj divastigon de Esperanto; D-ro Buttmann (nacisocialis) kaj Bauer (german-nacia) parolis malfavore blindigite de ŝovinismo. La kulturministro Goldenberger konfesas konscii la taŭgecon de Esperanto, sed li konsideras ke ankoraŭ ne estas veninta la tempo por solvi favore la peticion, atendante la definitivon venkon de iu lingvosistemo. Kaj oni decidis transdoni la peticion kiel materialon al la Registaro.

La Unuigita Asocio de germanaj fervojoficistoj tre interesiĝis por Esperanto kaj ĝia oficiala gazeto «Der deutsche Eisenbahner», kiu ne-regule iom diris pri Esperanto, komencis aperigi Esperanto-lecionojn. Ĉi tiu gazeto estas unu el plej grandaj germanaj fakgazetoj, kies abonantaro estas ĉirkaŭ 400.000 fervojistoj. Esperantistoj devas gratuli per poŝtkarto la estraron de «Deutscher Eisenbahner», str. Raukestr, 4. Berlin, W.

Japanujo.—Kaŭze de esperanto-kurso per la radio-stacio JOAK (Tokio) estas venditaj 15.000 lernolibroj, tutan eldonon oni elĉerpis, kio vidigas eksterordinaran sukceson por nia afero. Ankaŭ, bone sukcesis la Tago de la Esperanta Libro, eĉ tra la stratoj ne nur oni vendis librojn sed oni faris paroladojn al la publiko.

—S-ro Ito Koiĉi verkis dramon por kinematografo, kaj per ĝi li atingis la ĉefan premion en literatura konkurso de la grava ĵurnalo «ASAHI»,

kiu aperigas ĉiutagan felietonon el la dramo. La argumento de la dramo estas utopia lando «Nova Juno», kies prezidanto ĉiam parolas esperante kaj predikas la meritojn de nia lingvo. Sur la granda Almanako de la sama ĵurnalo aperas kvar paĝoj pri Esperanto; tial facile estas konscii la gravan propagandon per la dramo, ĵurnalo kaj Almanako en Japanujo.

La Nacia Laboratorio de Kemio kaj Fiziko organizis Esperanto Kurson sub gvidado de S-roj Maeda (el la Laboratorio), Okamota kaj Ura de Japana Esperanto-Instituto.

HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO

celas eldoni jare dekdu kajerojn, ĉiu el ili 32 paĝa almenaŭ, ĉiam kun a sama formato $13\frac{1}{2} \times 19\frac{1}{2}$ ĉm., pri literaturo, historio, legendoj, arto, k. c., de Hispanujo, kvankam iufoje aperigos rimarkindajn fremdajn tekstojn, kun ilustraĵoj foje, sur luksa papero, por havigi al la Esperantistaro interesajn legotaĵojn.

Abono por la serio estas OK pesetoj KVINDER centimoj, por ĉiuj landoj, kaj abonanto rajtas ricevi senpage ĉi tiun gazeton, kaj ĵus aboninte la Bibliotekon, li ricevos NAŬ kajerojn el ili: «AVILA» kun 30 bildoj; «FERDINANDO VI kaj FARINELLI», novelo verse kaj proze verkita; «EL MODERNA HISPANA PARNASO» kun belegaj bildoj; «PRI HISPANUJO KAJ ĜIAJ POPOLKANTOJ», kun muzikaĵoj de Murcia; «DU JUNAJ FRAŬLINOJ» kaj «KORNELIINO», du noveloj de la aŭtoro de «DON KIĤOTO»; «DON KIĤOTO» (unuan kajeron de la tutmondfama verko de Cervantes), k. c. Ĉi tiu lastan kajeron nur havigos aparte S-ro Ludoviko Torrent (Presejo. Strato Válgame Dios, 6 Madrid), al kiu povas sin turni por mendoj interesatoj. S-ro Torrent faros rabaton, 10%, kian mendo minimume atingos 50 specimenojn; por mondo de 250, 500 kaj 1.000 specimenoj, la respektivaj rabatoj estas 20%, 30% kaj 40 %. Ĉiam estas postulata antaŭpago.

Speciale la Grupoj kaj Asocioj devas aboni la Hispana Esperanto-Biblioteko'n, ĉar neniu alia libraro kune kun tre interesa kaj bela gazeto estas pli malkara, ol la Hispana, kiu samtempe estas tre fidinda, ĉar abonanto, tuj de post la abono, ricevos naŭ librojn, kaj ĉiumonate kun granda akurateco ĉi tiun gazeton.

PRESEJO LUDOVIKO TORRENT KAJ K^o
Válgame Dios, 6.-MADRID-HISPANUJO